

Migrado de kukolo

Al mia enketo pri la migrado de la kukolo, entreprenita en 1961 pere de la esperanta gazetaro, envenis ĉirkaŭ 120 respondoj. Ili donas sufiĉe bonan ideon pri la migrado en okcidenta Eŭropo. Bedaŭrinde tro multe mankas informoj el suda kaj orienta Eŭropo, el okcidenta Azio kaj el norda Afriko.

Tial mi decidis daŭrigi la enketon dum pluraj sinsekvaj jaroj kaj mi petas ke vi helpu min ankaŭ en la venontaj jaroj, sendante do jenajn informojn:

- a) loko de la observo kaj situo rilate gravan urbon
- b) dato de la alveno de la unua kukolo
- c) aspekto de la regiono
- ĉ) (se eble) veterkondiĉoj dum la pasintaj tagoj
- d) via nomo kaj adreso

Se eble, petu la kunhelpon de ornitologoj el via regiono aŭ de viaj korespondantoj. Speciale interesaj estos al mi informoj el regionoj apud maroj aŭ montaro, kaj el Afriko kaj Azio.

La rezultoj de la enketo 1961a aperos post kelkaj monatoj en iu esperantlingva revuo. Personoj, kiuj deziras havi kopion de la teksto, bonvolu peti ĝin al mi. Post kelkaj jaroj aperos pli ĝenerala studo en iu scienca revuo.

En siaj leteroj pluraj informitoj sugestis starigi esperantlingvan rondon por ornitologoj. Sekve de tio, ni starigis iniciatan komitaton, kiu preparos la fondon de tiu rondo. Ĝi rilatis al ĉiuj personoj kiuj interesiĝas pri birdoj en la plej ĝenerala senco. Ni intencas elektiĝi definitivan estraron en la venontaj monatoj.

Personoj kiuj deziras aliĝi, estas petataj sendi sian aprobon, kaj eventuale ideojn kaj sugestojn al la provizora sekretario:

H. Tiepermann, de Burburestraat 28, Antwerpen, Belgio.

W. De Smet
Graaf van Egmontstraat 16
Antwerpen
Belgio.

La manuskriptojn por SR oni sendu al la ĉefredaktoro: Marinko Ĝivoje, Gornji trg 31/II, Ljubljana - 13, Poŝtfako 18, JUGOSLAVIO

PEZOSENTO KAJ SPIRADO DUM INTERPLANEDA VOJAĜO

Prof. B. POPOVIĆ (Jugoslavio)

Interplaneda vojaĝo estos ofte malagrabra en siaj detaloj, almenaŭ por unuaj vojaĝantoj. Mi provas ĉi tie image prezenti tian vojaĝon surbaze de la ĝisnunaj eksperimentaj esploroj faritaj en diversspecaj laboratorioj kaj per la raketoj, utiligante kompreneble ankaŭ nemultajn spertojn de la unuaj du vojaĝintoj ekster la tera atmosfero (Gagarin el Sovetunio kaj Šeperd el Usono).

KOMENCA BRUO KAJ LA PEZO

La vojaĝantoj eniras la ŝipon kaj tie ili surmetas specialajn vestaĵojn antaŭ doni la signon ke ĉio estas preta por la ekveturo. La raketmotoroj ekfunkcias kaj el la raketo kun bruego komencas fluadi amasego de gaso ĵus kreita per bruliĝo. Pro sekureco, ĉirkaŭ la raketo troviĝas neniuj, eĉ ne deĵorantoj kiuj ekfunkciigis la motorojn kaj sekvas la komencan flugon de la raketo — ili troviĝas en aparta neproksima kavo. Se ili estus apud la raketo, ili ne povus elteni la bruegon kaj la venton de elfluantaj gasoj.

Niaj vojaĝantoj ne aŭdas la bruegon, aŭ ĝi aŭdiĝas tre malfortigita. La ĉapo kiun ili surmetis kune kun la speciala vestaĵo servas ankaŭ por izoligi iliajn orelojn de la ĉirkaŭaĵo. Kontraŭe homo kun iom nestabilaj nervoj ne povus elteni la bruegon.

Sed ili sentas ion alian malagrablan. Iu forto premas ilin fortege sur ilian seŭnon. Nur kun tre granda peno ili levas siajn manojn, ne tiom pro la malkomforta vestaĵo kiom pro la pezo-sento. Al ili ŝajnas ke iliaj manoj fariĝas kelkoble pli pezaj ol ili estis. Tiuj kiuj kviete sidas, aŭ pli bone dirite kuŝas, en sia speciala seĝo tamen ne havas tiom fortan senton de la pezo — al ili ŝajnas ke ilia pezo fariĝis nur 2—3-oble pli granda. Ili dankas tion al elasteco de sia vestaĵo, kiu enhavas tavolon de enpremita aero. La seĝo ankaŭ havas tian tavolon. Ili helpas plimildigi la »baton« devenanta de la subita ekiro, de la konstante kreskanta rapido (tiel nomata akcelo).

La »seĝoj« estas fiksitaj tiel ke la korpo kuŝas orte al la movdirekto, pli precize dirite la linio de la movdirekto iras de la brusto al la spino, ĉar tiel la vojaĝantoj povas plej facile elteni grandan akcelon de la raketego en kiu ili troviĝas. Se ilia kapo estus antaŭ ili en la direkto de moviĝo, ilia sango forirus el la kapo al la gamboj, la cerbo restus nenu-